

Joseph Mohr,  
Kristnaska kanto

*tradukita de N. N. 04*

1. Paca nokt', sankta nokt'!  
Mutas nun eĉ la vent'.  
Jen maldormas nur plena par';  
ĉarma knabo kun bukla harar'.  
Dormu plu en silent'!  
Dormu plu en silent'!

2. Paca nokt', sankta nokt'!  
Tra l' aer' vibras kant'.  
Al paŝtistoj proklamas anĝel':  
Li kondukos vin al la ĉiel',  
Li, de l' mondo Savant',  
Li, de l' mondo Savant'.

3. Paca nokt', sankta nokt'!  
En la mond' Fil' de Di'!  
Am' radias al ni el ĉi kor'.  
Por elsavo nun sonas la hor':  
Krist' naskiĝis por ni!  
Krist' naskiĝis por ni!

*Traduko de la Germana poemo "Weihnachtslied" de JOSEPH MOHR (\*1792 – †1848) en Esperanton de N. N. 04.*

*Arg-136-270 (2012-07-26 15:23:29)*

*Tiu ĉi traduko de la konata germanalingva kristnaska kanto konsistas nur el la unua, sesa kaj dua strofoj (en tiu ĉi vico) de la origina sesstrofa teksto de la kanto. Vidu en [http://www.stillnacht.info/de/stillnacht/d\\_noten.htm](http://www.stillnacht.info/de/stillnacht/d_noten.htm). Estas la tri strofoj, kiuj estas konataj kaj kutime kantataj. La Esperantigo de ĉiuj ses strofoj troviĝas en tiu ĉi poem-kolekto [Argiop. blorg.net](http://www.poezio.net) sub la poem-titolo "Stille Nacht".*